# ĈEA-Retkomunikoj 2017/02

Estimata leganto

venis denove la tempo por nova ĈEA-Retkomunikoj. En tiu ĉi numero ni ŝatus informi vin ĉefe pri nova poŝtelefona aplikaĵo "Amikumu" kaj ankaŭ pri proksimaj eventoj. Do, agrablan legadon!

## Plej freŝaj novaĵoj

### Muzea nokto kaj inaŭguro de la nova ekspozicio en Esperanto-Muzeo en Svitavy proksimiĝas!

Tradicie ĉiam junie okazas muzea nokto en Svitavy, kiu okazos en Esperanto-muzeo kaj en Urba muzeo kaj galerio en Svitavy. Tiu ĉi aranĝo havas en la urbo jam longan tradicion, en kiu partoprenas ankaŭ nia Esperanto-muzeo. Ni konatigos vin kun la programo en la E-Muzeo kaj en Ottendorfer-domo, sed riĉa programo estos ankaŭ en la proksima Urba Muzeo kaj Galerio.

Post tiu ĉi aranĝo sekvos sabata inaŭguro de la nova ekspozicio "La Homo kontraŭ Babelo" **kun internacia partopreno (inkl. Japanion), riĉa tuttaga akompana programo kaj dimanĉa ekskurso al Litomyšl, kiuj okazos komplete en Esperanto**.
Gastos ĉe ni i.a. Bernhard Tuider el Esperantomuzeo en Vieno kaj Peter Baláž, sendube interese prelegos kaj projekcios Petr Chrdle kaj Ján Vajs, vespere kantos spiritualojn la grupo NO PROBLEM. **Restas la lastaj lokoj por tranokto!!** Interesitoj bv, laŭeble tuj kontakti sinjorinon Libuše Dvořáková per retpoŝto (dvor.libuse@seznam.cz). Detaloj troviĝas en la supra ligilo pri la aranĝo. NI ĜOJATENDAS VIAN ABUNDAN PARTOPRENON!

### Amikumu: nova poŝtelefona aplikaĵo

Per frazo „Trovu kaj kontaktu esperantistojn apud vi – ĉiam, ĉie“ eblas priskribi novan poŝtelefonan aplikaĵon, kiun kreis konata usona esperantisto Chuck Smith. Do, Amikumu estas apo, kiu helpos vin trovi kaj kontakti proksimajn esperantistojn kaj parolantojn de aliaj lingvoj. Nuntempe la apo subtenas nur la esperantistaron. Pli da lingvoj tamen venos baldaŭ! Kaj kiel ĉio funkcias? Legu nian novan artikolon!

### Retejo pri Zamenhof nun ankaŭ en la ĉeĥa lingvo

Dank al laboro de Petr Diblík nun jam funkcias ankaŭ ĉeĥa versio de retejo Zamenhof.info dediĉita al L. L. Zamenhof omaĝe al 100 jaroj ekde lia forpaso. Dankon!

### Listo de interrete aŭskulteblaj registraĵoj de Miroslav Smyčka



Omaĝe al la forpaso de baritonisto, honora membro de ĈEA Miroslav Smyčka ni preparis al la tutmonda esperantistaro liston de la ĝis nun alirebligitaj muzikaj kaj literaturaj registraĵoj de la artisto. Longan liston vi povas trarigardi ĉi tie.

### Aktualaĵoj en la Muzea paĝo ĉe Ipernity

1) Novaj dosieroj en la albumo ZAMENHOF:

- Inkluzivitas ankaŭ interesa sonprelego de William Auld "Pri altruismo, pri Zamenhof, pri Ludovikito".

2) Du sonfabeloj el la afable humuraj "Naŭ fabeloj" de Karel Čapek:

- Fabelo policista (Kio okazos, se dumnokte en la policejo el trovita granda ovo elkoviĝos malgranda drakido?),
- Solimana princidino - Tradukon de Josef Vondroušek laŭtlegas Tadeusz kaj Ivana Karaš el Kamenice n.L., membroj de la Sekcio de nevidantoj de ĈEA.

3) Otokar Březina - Eterne denove - La poemon en traduko de Jiří Kořínek deklamas Miroslav Smyčka
4) Memestimo - ĉu psikologia panaceo? - produktita en Brazilo, kun samtempaj subtekstoj por pli komforta sekvado

# Eventoj

*Ni elektas el la plej proksimaj eventoj, kiuj okazos ne nur en Ĉeĥio:*



### 4/6: 8-a Tosto por Zamĉjo

Festu la JARON DE ZAMENHOF kaj venu partopreni la aranĝeton TOSTO POR ZAMĈJO. La aranĝo okazos la 4-an de junio en Brno. Detaloj pri la aranĝo ĉi tie.

### 18/6: Renkontiĝo je Ĉantorio

Tradicia renkontiĝo de ĉeĥaj, polaj kaj slovakaj esperantistoj surpinte de la monto Granda Ĉantorio ĉe la ĉeĥa-pola landlimo okazos la 18-an de junio. Info: suchanekj@seznam.cz

### 15/7-23/7: Somera Esperanto-Studado (en Slovakio)

La 11-a internacia renkontiĝo de studentoj de la interreta portalo Lernu.net. Antaŭtagmeze lingvoisntruado en diversgradaj kursoj, posttagmeze prelegoj, ekskursoj kaj sporta programo, vespere bunta kultura programo kaj amuziĝo. Ĉiuj informoj en la retejo ses.ikso.net

### 11/8-13/8: 20-a renkonto de ekstendaranoj (de Somera Esperanto-Tendaro Lančov)

Solena renkontiĝo de eksaj tendaranoj kaj amikoj en Lančov. Informojn petu per retpoŝto: info@set-lancov.cz

### 22/9-29/9: Internacia renkontiĝo en Svitavy

Semajna aranĝo de la klubo de amikoj de Esperanto en Svitavy organizos Internacian renkontiĝon en Svitavy de la 22-a de ĝis la 29-a de septembro. Pli da detaloj vi povas trovi ĉi tie.

### 13/10-15/10: Konferenco de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

Pinta aranĝo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kun labora traktado, temaj seminarioj kaj programoj ekskursa, kultura kaj amuza. Informojn sekvu regule ĉe la asocia retejo. ATENTU - ŜANĜO DE LA OKAZLOKO! NOVE LA ARANĜO OKAZOS EN URBO KROMĚŘÍŽ!

Ĉu vi volas aboni ĈEA-Retkomunikojn? Skribu al retkomunikoj@esperanto.cz!